

Kluba Programo:**marto**

- 01 Lingva vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)
- 08 1800h Konsilantara kunsido
1915h Ljubiša Preradović kaj Mag. Gordana Preradović.: *Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Bosnio kaj Hercegovino.* - ĉe DIORAMA
- 15 Lingva vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)
- 22 **Kluba Jarkunsido** - ĉe DIORAMA
- 29 Literatura vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)

aprilo

- 05 Literatura vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)
- 12 Lingva vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)
- 19 **Neniu kunveno** (pro Pasko)
- 26 1800h Konsilantara kunsido
1915h Andreo Marshall: *Muzik-terminoj en Esperanto - miaj ĝisnunaj esploroj* - ĉe DIORAMA

majo

- 03 Lingva vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)

Esperanta Kalendaro:

16 marto 2019: Jarkunveno de Orienta Esperanto Federacio ĉe *Church House, St Michael's Lane, Braintree, Essex CM7 1EY*
ap_esp-lek21@yahoo.co.uk

12 – 16 aprilo 2019: Brita/Franca Esperanto-Kongreso, The Ark, Dover – <http://britakongreso.org>

20 – 27 jul 2019: 104a Universala Kongreso de Esperanto – Lahtio, Finnlando
<http://uea.org/kongresoj>

Aliaj anoncoj:

Ni aŭdis pri la forpaso de Alan Shrives, dumviva membro de LEK. Dum lastaj jaroj li loĝis en Kimrio, do ne povis veni al la klubo.

Bonvolu sendi informon al la bultenisto antaŭ 15a de aprilo por mencio en la sekva Kluba Bulteno



Arĉinstrumentisto Andreo Marshall prelegos pri siaj esploroj rilate muzik-terminojn kiuj jam okupis lin dum 30 jaroj. Atendu viglan partoprenon en la vespero ĉar Andreo petos viajn opiniojn pri kelkaj tiklaj punktoj.



EProf. Dr. Ljubiša Preradović
M. Sc Gordana Preradović
prelegos la 8an de marto


Bosnio kaj Hercegovino (BkH) protektas la pozicion kaj egalecon de membroj de naciaj minoritatoj: albanoj, ciganoj, ĉeĥoj, germanoj, hebreoj, hungaroj, italoj, makedonoj, montenegranoj, poloj, rumanoj, rusenoj, rusoj, slovakoj, slovenoj, turkoj kaj ukrainoj kaj aliaj, kiuj plenumas ĉi tiujn kondiĉojn.

Nacia minoritato estas parto de la loĝantaro - civitanoj de Bosnio kaj Hercegovino, kiuj ne estas membroj de iuj komunaj (konsistigaj) popoloj (ortodoksuloj, katolikoj kaj islamanoj) kaj formas civitanojn de la sama aŭ simila origino, la samaj aŭ similaj tradicioj, kutimoj, kredoj, lingvo, kulturo kaj spiriteco kaj proksime aŭ rilataj historiaj pasintaj kaj aliaj trajtoj.


Dum la prelego estos prezentitaj 45 religiaj objektoj de naciaj minoritatoj kiuj apartenas al ok naciaj minoritatoj (ĉeĥoj, germanoj, hebreoj, italoj, poloj, rusoj, slovakoj kaj ukrainoj).

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 3FE
(por kunveno kun programo);



Ibis London City – Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,
London E1 6BF (por diskutvespero)



Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido

19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 – 20:45 paŭzo

20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj “Victoria”, “Northern”), Euston Square (“Hammersmith & City”, “Circle”), Regents Park (“Bakerloo”).

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453, C2.

Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East – uzu la eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj “Hammersmith & City”, “District”); Aldgate (linioj “Circle” “Metropolitan”).

Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>.

Letero de kluba Konsilanto



Bonvenon al la nova bulteno kaj al la nova jaro. Kiel Matt diris en la lasta bulteno, ni decidis, ke ĉiu konsilantarano verku leteron dum la venontaj kelkaj bultenoj, kaj mia vico okazas en ĉi tiu bulteno.

Unue, mi prezentu min. Mi estas Chris Lewis. Mi estas kimro, sed nun mi laboras en Londono. Tamen, kore mi ankoraŭ estas kamparano, kaj bezonas kampojn kaj arbarojn ĉirkaŭ mi, do mi loĝas ekster Londono, apud Hertford, kun mia familio. Mi estas ano de la LEK-a konsilantaro dum du jaroj.

Dum la lastaj du monatoj la klubo okazigis kelkajn diversajn aferojn. Unue, la 11an de januaro, okazis la novjara festo kaj laŭ ĉiuj raportoj, ĉiu el la pli ol dudek ĉeestintoj taksis ĝin granda sukceso. Alia socia evento, la komuna manĝo, okazas la 22an de februaro. Kiam mi verkis ĉi tiun leteron, la manĝo estis okazonta, sed mi certas, ke multaj homoj ĉeestos kaj ĝuos. Dankon de la konsilantaro al Daniel Hayon pro lia organizado de la manĝo.

Cetere, okazis du prelegoj, unu pri komencantoj en Esperantujo, kaj la alia pri Italujo. Okazis ankaŭ kelkaj literaturaj kaj lingvaj vesperoj.

Kiaj viglaj unuaj du monatoj de la jaro por LEK, ĉu ne?

Tamen, malgraŭ la proverbo de Zamenhof, mi certas, ke la “komenco bona” de la jaro por LEK ne indikas duoniĝon de laboro dum la cetera parto de 2019! Male! La kalendaro jam enhavas multajn ekscitajn okazojn, dum la sekvontaj du monatoj (bonvolu rigardi la kalendaron en la supra parto de la bulteno), kaj poste.

Sed la celo de la letero ne estas nur laŭdi la ĝisnunan laboron. La konsilantaro volus scii la specojn de okazoj, kiuj plaĉus al vi. Se vi havas ideon pri eblaj estontecaj okazoj (aŭ volus volontuli gvidi vesperon), bonvolu informi nin. Nur per kompreno de la deziroj de ĉiuj Londonaj Esperantistoj LEK restos ĉies klubo.

Chris Lewis

Funkciuloj: Honora Prezidanto:

Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti (Programo), Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).



Partoprenintoj en la Novjara Festo de LEK

Fotis Olga Kerziouk

Adresoj: David Thornell:

lek.sekretario@gmail.com;
Arturo Prent: 7 Walton Garden,
Hutton, Brentwood CM13 1EJ
ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,
Terry kaj Anica Page: 7 Hampton,
Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP
terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com,
Antony Rawlinson: 5 Thorpe
Crescent E17 5BY
acj.rawlinson@ntlworld.com